

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 7 fkoj
Bonfara : 12 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JANUARO - FEBRUARO

1968 **1**

KULTURAJ KAJEROJ

1968 JANUARO-FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represajo.

ENHAVO

El Gresillon
Al vi, kiu de longe ne vizitis la Kulturdomon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Grenoble
Loko de paca alfronto de popoloj

Rabelais
Diboĉulo aŭ Klerulo (1) J.-P. Guillot

La misteraj revelacioj de la granda piramido
Abato Moreux (trad. C. Bourlet)

Antaŭ centjaroj naskiĝis Maksimo Gorki

Poemoj : A. Fowler
Originalaj kaj tradukitaj K. Vaatanen
A. Boldan

Monologo
La Tigro S. Meyer

Por via distro
Nia Konkurso P. Chevalier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

Al VI, Kiu de Longe ne Vizitis la Kulturdomon

Antaŭ 16 jaroj, en februaro, nia neforgesebla H. Micard faris al si la demandon : « Ĉu ni povos malfermi Grésillon venontan someron ? ». Jam de pluraj semajnoj la societo posedis belan bienon sed mankis la mono por ĝin ekipi per elektra kurento, akvo, litoj, ŝrankoj, kuriloj, manĝiloj, ktp. Dua etapo de granda entrepreno, kiu solviĝis dank' al la laboro de kelkaj bonvoluloj, kiuj helpis du profesiulojn dum la Paskaj Ferioj. Ankaŭ dank' al prunto de materialo, la kastelo povis akcepti siajn unuajn vizitantojn en Julio.

La gesamideanoj, kiuj, tiam ĉeestis la unuajn renkontiĝojn certe memoras, ke ili alportis siajn littukojn, kelkajn kovrilojn. Ke ili partoprenis en la purigado de la teleroj kaj de la manĝoĉambroj. Ke ili preparis la legomojn kaj alportis la pladojn al la tabloj. Ke la komforto estis iom akceptebla. Sed jam, la etoso estis ege agrabla. Tamen kelkaj (nur kelkaj) riproĉis tiun mankon de komforto ĉar ili ne komprenis, kiom da sindonemo sin kaŝis malantaŭ la ankoraŭ ne kontentigaj atinĝaĵoj. Ili ne sukcesis sufiĉe forgesi la materiajn facilaĵojn, kiujn ili ĝuis hejme aŭ povis ĝui en hotelo, por plene kompreni la grandan ŝancon donitan al la esperantistoj.

Post 16 jaroj, se ili revenos ili povos trovi la saman etoson kaj plie konstati la materiajn plibonigojn. Ili trovos varman akvon sur ĉiu etaĝo, eĉ en pluraj ĉambroj. Kvar duŝejoj estis konstruitaj kaj ankaŭ novaj ĉambroj. Konstanta



laboro de sindonemaj amikoj ebligis la modernigon de pluraj aliaj ĉambroj. Banejo estis taŭge aranĝita. Ili ne plu estos devigataj helpi en la preparado de la manĝoj. La vivo plikomfortiĝis en Grésillon.

Tion oni povis fari nur ĉar la vizitantoj estis nombraj ĉiujare. Estas necese, ke ili estu pli kaj pli nombraj. La devigaj elspezoj (impoŝtoj, prizorgado de la bieno, necesaj riparoj) estas grandaj kaj ĉiam kreskantaj. Novaj plibonigoj estos eblaj nur se la enspezoj de tri monatoj multe superas la elspezojn de tuta jaro, kompreneble. La administrantaro de la Domo faras sian eblon, kvankam la laboro estas grandega tiucele ; nur la ĝardenisto kaj la servistaro ricevas salajron. Ankaŭ la esperantistoj faru sian eblon per multnombra vizitado. Se la kastelo estus plena dum tri monatoj multo estus farita, kion profitus la vizitantoj. La vojo irita en 16 jaroj estas jam tre longa. Ĝi ne atingis sian finon. Ĝi povas konduki al tre alloga estonteco. Iru tiun vojon kun ni. Despli facile estas, ke ĝi trairas la belan landon de amikeco.

Esperanto tra la Mondo

La esperanto-manifestacioj 1968

— La 60a nacia franca kongreso de esperanto, dum kiu la Franca Unuiĝo (UFE) festos sian 70an datrevenon, okazos dum Pasko (12-16a de aprilo), en Aix-en-Provence, kun riĉa programo. Adreso : 28, rue Portalis, 13 - Aix-en-Provence.

— En la sama urbo (sama adreso) okazos en Aŭgusto (13-20) la 3a Kongreso de STELO. Gestudentoj, petu la programon.

— Je la samaj datoj, la « markola kongreso » okazos en St Mary's Bay (Britujo, kun la ĉeesto kutima de britoj, francoj, belgoj, nederlandoj. Adreso : G. Hawker, 66 Black Bull Road, Folkestone Kent, Anglujo.

— 6-13a de Aprilo : Internacia Junularkunveno de Germana Esperanto-junularo, en Aachen. Temo : « Eŭropo dancas kaj kantas ». Informo Hermann Gehrmann, Volksschule-Süd, 4972 Lohne-Obernbeck, Germanujo.

— Dato de la Internacia Iunulara-kongreso en Tarragona (Hispanujo) 22-7 - 3-8. Adreso : S-ro Salvador Aragay, Str. Arce 8-2-4, Cornella, Hispanujo.

— Adreso por la restadoj en Primôsten : Internacia Esperanto-somerumejo, Primôsten, ĉe Sibenik, Jugoslavio. Petu belegan kolorprospekton por viaj klubanoj !

— Internaciaj kulturaj ferioj preparîĝas en Jugoslavio, en 1968, sub patronado de « Instituto por oficialigo de Esperanto » (IOE), en diversaj lokoj turismaj. Petu informojn al : IOE-Turisma fako, Pôstfako 213, Zagreb 2, Jugoslavio.

— Ne forgesu la studperiodojn en Grésillon. Petu la programon.

Interŝanĝa tendaro

— Francaj geknaboj esperantistaj, 12-16 jaraj kun plenkreskaj estroj povos partopreni interŝanĝan tendaron en Francujo kaj Ĉeĥoslovakio, dum la somero 1968. Rilatu kun la tenduma fako ICIEK. Sro René Lavallée, 63, avenue Carnot, 33-Bordeaux-Caudéran.

Koresponda Servo de U.E.A. :

Sendu aŭ petu adresojn : Fino Hueter, 12, rue des Jacobins, 63 - Clermont-Ferrand, Francujo.

Eldonaĵoj

— « Ĉu ankaŭ vi scias ? », libro por 6-7 jaraj infanoj, koloraj ilustraĵoj, bindita (eldonita en Hungarujo).

— « La spleno de Paris », prozpoemaro de Baudelaire, tradukis Paul Lobut, N° 8 de la prestiĝa serio « Oriento-Okcidento ».

— « Vojaĝimpresoj de Egipto tra Azio kaj Eŭropo per esperanto » de Dro Nassif Isaac.

— « Vesperkanto » poemaro de Hendrik Adamson, 131p.

— « Pri arto kaj morto », originala novelaro de Miyamoto Masao (epizodoj el la vivo kaj morto de famaj artistoj japanaj).

— « Ne grimacu ! », originalaj humoraj rakontoj de Ueyama Masao.

— Reaperas en Italujo : « Biblia Revuo », dumonata gazeto pri bibliaj kaj orientaj studoj. Provnumero sendita de la revuo. Adreso : Piazza duomo 4, 48100 Ravenna. Jara abono : 6 dolaroj.

— Ĵus reeldonita estis, en franca lingvo « ABC d'esperanto à l'usage de ceux qui aiment les lettres ». Eldonis SAT, havebla ĉe nia Libroservo.

— Ĵus aperis ĉe eldonejo Nagasue Shoten la unua volumo de pli ol 1200 paĝa biografia romano pri Ludoviko Zamenhof. Samtempe ĝi aperadas feliotone en litteratura revuo « Viking ».

Esperanto kaj sciencistoj

— Prof. Alfred Kastler, kiu ricevis la Nobel Premion pri fiziko, akceptis la honoran prezidentecon de la esperanto-centro en Guebwiller, Francujo.

— Kongreso de esperantaj amatoraj astronomoj preparita de Astronomia observatorio de Zilina, Ĉeĥoslovakio. Informoj : Ludova Hvezdoren, mesta Ziliny, Ĉeĥoslovakio.

— Specialistoj, ĉu vi konas la tre interesan revuon « Kemio internacia » ? Eldonas Urugvaja Esperanto-Societo, Casilla de Correo 1040 Montevideo.

— La Geologia Sekcio de la internacia organizaĵo de Esperanto-parolantaj sciencisto (IS AE) prezentis al la Organiza Komitato de la 23a Internacia Geologia Kongreso, okazonta en Praha dum dek tagoj de aŭgusto 1968, proponon pri akcepto de la Internacia Lingvo Esperanto, kiel unu el la oficialaj lingvoj de la Kongreso. La proponon apogas la subskriboj de pli ol mil geologoj el diversaj landoj.

LOKO DE PACA ALFRONTO DE POPOLOJ

GRENOBLE

« Tiu lando estas mirinda kvankam nekonata. Nenio el kio mi jam vidis en Francujo estas komparebla al tiu valo de Grenoblo al Montmélian...

... Mi povas nur diri al la vojaĝanto : « Kiam vi trapasas Liono, pluiru dudek leŭgojn por vidi tiujn supernoblajn aspektojn ».

(Stendhal : Memornotoj de turisto).

« Subite, ĉe la kruciĝo de tri valoj, inter tri montmasivoj, sin dediĉinta al la tri modernaj diinoj : Universitato, Industrio, Turismo, jen la urbo de la tri rozoj ».


Paul Dreyfus.



Barono Pierre de Coubertin, renoviginto, en 1896, de la Olimpiaj Ludoj, deziris asocii fizikan strebadon kun kulturaj riĉaĵoj kaj naturaj belaĵoj. « Por fari Olimpiadon, li diris, potenco kaj mono ne sufiĉas ; necesas persistemo kaj toleremo ; estas necese havi serenan koncepton de la duobla rolo ludita de sporto en la grandaj modernaj demokratioj : ekvilibrigo de la homo kaj socia edukado ». Grenoble plenumas tiujn kondiĉojn pli ol la plej multo el aliaj lokoj.

En la koro de la francaj Alpoj, ĉirkaŭita de tri montmasivoj, Chartreuse, Belledonne kaj Vercors, ĉe la kunfluejo de la riveroj Isère kaj Drac, Grenoble staras. Origine, Grenoble estis ponto uzita en 43 a.k. de la romaj legioj survoje al la konkerota Gallio ; ĉirkaŭ la ponto kreskis urbo, baldaŭ defendita de fortreso. Grenoble, ĉefurbo de Daŭfenlando verkis la antaŭparolon de la franca Revolucio en Vizille, kie Asembleo petis en 1788 la kunvokadon de Ĉiuklasa Asembleo. Landlima fortika urbo, kiam Savojo estis Piemonta, halturbo sur la vojo iranta, tra la Alpoj, al la mediteranea marbordo, tie haltis Napoleono, kiam li triumfe iris de la insulo Elbe al Parizo.

Jam en 1339, per buleo de Papo Benedikto XIIa, Grenoble fariĝis universitata urbo. Hodiaŭ pli ol 20.000 studentoj el kiuj multaj alilandanoj partoprenas en la universitata vivo. La universitata progreso kaj la ekonomia kreskado estas intime ligitaj. Tie trovis akordon instruado, baza esploro kaj aplikata esploro. Tiu kunlaboro, kiu ebligis la kreadon de esplor-laboratorioj kaj la Alpa kadro, kie irigine naskiĝis la hidraŭlika industrio, ĵetis la urbon al la rango de granda industria urbo. Ĝia industrio, kiu hieraŭ sin apogis sur elektro, hodiaŭ sin apogas sur elektroniko kaj nuklea energio. Sed daŭre progresas ankaŭ tre diversaj industrioj : nutraj produktaĵoj, vestaĵoj, papero, aluminio, cemento kaj gantoj kiuj tie estas fabrikataj nun de ses jarcentoj.




Dank'al ĝia situo, Grenoble estis antaŭdestinita al Turismo. En 1889 estis kreita tie la unua el ĉiuj turismoficejoj. La « urbo de la tri rozoj » estas la

nekontestita metropolo de la montaro, kiu ĉiujare akceptas 250.000 turistojn (2 milionojn en la ĉirkaŭaĵoj), kaj malfermas por ili, en somero, profundajn arbarojn, florajn vojetojn inter mirindegaj rokoj, kaj, en vintro grandajn neĝokampojn. Ĉirkaŭ la urbo 17 vintraj stacioj naskiĝis kaj kreskis kaj en la urbo mem ekzistas belega olimpia glitkurejo.



Krom pri tiuj multaj allogaĵoj estas nepre necese paroli pri la trezorplena muzeo de Grenoble, kie la vizitanto povos admiri interesan kolekton de egiptaj antikvaĵoj ; pentraĵojn de la franca skolo (Philippe de Champaigne, Le Brun, Mignard, Lesueur, Coypel), de la nederlanda skolo (Rubens, Van der Meulen), de la itala skolo (Ribera, Zurbaran) ; fine la moderna pentroarto de ĉiuj skoloj estas prezentita de Monet, Renoir, Degas, Sisley, Pissaro, Fantin-Latour, Vlaminck, Matisse, Manet, Cezanne, Van Gogh, Rouault, Soutine, Gauguin, Utrillo, Dufy Chagall, Modigliani, Léger, Denain, Braque, Picasso.

En tiu urbo rigardanta al la estonteco, riĉa je kulturo, riĉa je naturaj valoraĵoj, okazas de la 6a ĝis la 18-a de februaro la vintraj Olimpiaj Ludoj : Grenoble aldonis kvin ringojn al siaj tri rozoj.



(22an de Julio — Ian de Aŭgusto)
(estas eble alveni la 21an kaj foriri la 3an)

SEMINARIO

Organizita de UEA.

Temo : Modernaj Formoj de Laboro en la Nuntempa Esperanto Movado.

Gvidanto : Dro Zlatnar el Ljubljana.

Partoprenos : Prof. D-ro Lapenna kaj aliaj plej kompetentaj respondeculoj de la Esperanto-Movado.

— Ekskursoj.

Ne plu atendu.
Tuj rezervu vian ĉambron
(E.K.D. **Grésillon — 49 - BAUGE,** Francujo)

RABELAIS, DIBOĈULO, aŭ KLERULO ?

Kvankam li estas tre fama franca verkisto, François Rabelais estas tre malbone konata. Tuj kiam oni aŭdas lian nomon, oni pensas, almenaŭ en Francujo, pri senmezuraj festenoj, pri senĉesa vintrinkado, pri bataloj inter bonaj gigantoj kaj stultaj reĝoj. Pli ĝenerale la nomo Rabelais elvokas diboĉadon ; la franca lingvo eĉ enhavas vorton : « rabelaiseries » (« rabelais-aĵoj »), kiu signifas samtempe kruda parolo aŭ ago, gaja vivo sen respekto al iu religio aŭ moralo, supermezuro en parolo, manĝo, trinko, ktp...

Sed tio estas nur la ekstera aspekto de la verkoj de Rabelais. Tiu monaĥo, kiu ankaŭ estis medicisto, kaj estris la latinan kaj la grekan lingvojn, estis granda filozofo, granda erudito, laŭ antikvaj sensoj de la vortoj, ĉar li tiel bone konis sciencojn, kiel verkojn de la plej diversaj poetoj aŭ filozofoj. Fakte li konis ĉion, kio estis konata en lia epoko.

Sed ni nun iom konatiĝu kun li. Lia naskiĝo estas enigmo. Oni diras ke li naskiĝis en Chinon en 1483, en familio de apotekisto. Sed aliaj asertas, ke li naskiĝis en vilaĝeto (pli precize en domo nomita « la Devinière ») proksime de Chinon en 1494, kaj ke lia patro estis notario. Sed ne tro gravas la precizaj lokoj kaj datoj. Sufiĉas scii, ke li pasigis siajn unuajn jarojn en tiu tipa regiono ĉirkaŭ Chinon, sur la bordo de la rivero Vienne, kie abunde kreskas la vinberoj.

Li faris siajn elementajn studojn en Angers, kaj poste iĝis monaĥo en Fontenay-le-Comte, proksime de La Rochelle. Tio estis eraro, ne ĉar la monaĥa vivo malplaĉis al la junulo, sed ĉar, en tiu monaĥejo, ĉia studado estis malpermesita. Sed François nepre volis studi, precipe la grekan lingvon, kiu, en tiu tempo, aspektis kiel suspekta lingvo, permesanta la legadon de herezaj tekstoj. Tio estis lia nura kulpo, sed li devis foriri el la monaĥejo. Tiam komenciĝis liaj multnombraj vojaĝoj : — Romo kun Du Bellay, — Montpellier, kie li studis medicinon, — Lyon, — denove Montpellier, kie li eldonis « La faroj kaj diroj de la giganto Gargantua, kaj de lia filo Pantagruel ».

Ĉar li timis pri la reagoj de ĉiuj potenculoj kiujn li atakis en sia libro, Rabelais forlasis Francujon, kaj refuĝis en Metz. Sed liaj potencaj amikoj ebligis al li iĝi paroĥestro en Saint-Maur-des-Fossés kaj fine en Meudon, kie li mortis en 1553, dirante : « Fermu la kurtenon, la farso estas ludita ».

Kia vivo li havis ? Ĉu, kiel diras Scaliger, li estis diboĉulo kun malbonaj moroj ? Oni konas tri infanojn naskitajn de li, kaj tio ŝajnas stranga por monaĥo, Sed oni devas reiri per la menso, al tiu epoko, kaj rememori, ke eĉ papoj havis konatajn infanojn. Tiuj infanoj ne estis forlasitaj de la patro, ili eĉ estis tre ofte legitimigitaj, kiel estis la infanoj de Rabelais.

Fakte oni ne povas pruvi, ke Rabelais estis diboĉulo, almenaŭ laŭ la moroj de lia tempo. Ĉu tial, oni devas konsideri, ke li estis tre saĝa homo, kiel asertas Antoine Leroy : « Lia domo, fermita por la virinoj, estis malfermita por la scienculoj, kun kiuj li ŝatis paroladi. Li malamis nescion, precipe ĉe la ekleziuloj, kaj retrovis, por priskribi la analfabetajn pastrojn, la naturan vervon de la aŭtoro de Pantagruel. Fakte, nur al ili li rifuzis sian kompatemon. La malriĉuloj ĉiam estis certaj trovi helpon el lia monujo. Li estis tiel honesta, ke neniam iu surprizis lin mankantan al sia parolo. Fine liaj medicinaj konoj faris lin duoble utila en sia paroĥo »


Tiu aserto ankaŭ ne estas pruvo pri la klereco de Rabelais, nur minimuma kono de lia verko povas doni respondon al la demando : ĉu Rabelais estis diboĉulo aŭ klerulo ? Ni vidu, kiel ekzemplon de lia verko, la rakonton titolitan : « La tre honoriga vivo de la granda Gargantua, patro de Pantagruel, skribita de Sro Alcofribas » (Rabelais tiel subskribis siajn unuajn librojn). Preskaŭ ĉiuj eventoj de tiu libro okazas precize en la regiono ĉirkaŭanta Chinon. Gargantua estis filo de du gegigantoj nomitaj Grangousier kaj Gargamelle. Li naskiĝis iun tagon de Februaro. Sed tiu naskiĝo mem estis tre eksterordinara ; jen kiel okazis :

« Pro troa manĝo da tripoj, la utero supre malfermiĝis, pro kio la infano abrupte ekmoviĝis, kaj eniris « la pordvejnon ; kaj suprenirante tra la diafragmo ĝis « super la ŝultroj, kie la jam nomita vejno dispartiĝas, « laŭiris maldekstren, kaj eliris tra la maldekstra orelo. « Tuj kiam li estis naskiĝinta, li ne kriis kiel la aliaj in« fanoj, sed laŭtvoĉe : « Mi soifas, mi soifas », kvazaŭ « li invitus ĉiujn je trinkado, kaj tiel laŭte ke oni aŭdis « lin el le tuta regiono Beusse kaj Bibarois. »

Oni bone komprenas, ke, post tia naskiĝo, Gargantua ne povis havi normalan vivon. Jen kiel li vivis en sia infanaĝo :

« Inter sia tria kaj kvina jaroj, Gargantua estis nu« trata kaj edukata konvene, laŭ ordono de sia patro ; li « pasigis sian tempon, kiel la infanoj de la regiono. Tio « estas : trinkante, manĝante, kaj dormante ; manĝante, « dormante, kaj trinkante ; dormante, trinkante, kaj man« ĝante.

« Ĉiam li sternaĉis sin en ŝlimo, li ungogratis sian « vizaĝon, li eluzis siajn ŝuojn, ofte gapis al la muŝoj kaj « volonte kuris post la papilioj, kiujn regis lia patro. Li « urinis sur siaj ŝuoj, fekis en sia ĉemizo, purigis sian na« zon sur sia maniko... Li akrigis siajn dentojn per ligno« ŝuo, lavis siajn manojn en la supo, sin kovris per akvu« mita sako, trinkis manĝante sian supon... sin kaŝis en la « akvon por sin ŝirmi de la pluvo, metis la ĉaron antaŭ « la bovoj, li hufoferis la cikadojn... »



« Naskiĝdomo de Rabelais », La Devinière

Kaj Gargantua faris multe pli da strangaĵoj, kiujn ne necesas reskribi, ĉar tiuj ekzemploj sufiĉas por montri ke oni tute pravas kiam oni faras al si la demandon : ĉu vere tio havas senĉon ? ĉu ne estas nur stultaĵoj ?...

Sed Gargantua kreskis kaj post kelkaj aventuroj li alvenis en Parizo por studi sub la gvidado de Ponocrates :

« Gargantua por siaj studoj plene fidis Ponocrates ; « tiu lasta, en la komenco, decidis, ke oni faros, kiel « kutime, por scii kiamaniere,dum tiu tempo, la maljunaj « guvernistoj de lia lernanto estis farinta lin tiom mal- « modesta, tiom stulta, tiom senscia.

« Gargantua tial pasigis sian tempon tiel ke, ordi- « nare, li vekiĝis inter la oka la naŭa, tagus aŭ ne ; tiel « estis ordonintaj la profesoroj pri teologio. Poste, li sal- « tetis, stamfis, sin rulis sur sia lito por pli bone amuzi « sian spiriton ; Poste li sin vestis laŭ la sezono, li sin « kombis per la kombilo de Almano, t. e. la kvar fingroj « kaj la dikfingro : ĉar liaj guvernistoj diris, ke estis « perdi sian tempon sin lavi, sin kombi, kaj sin purigi.

« Post kio, li fekis, urinis, ruktis, furzis, oscedis, « kraĉis, tusis, plorsingultis, ternis same kiel ĉefdiakono.

« Por venki la roson kaj la malbonan aeron, li, pos- « te, matenmanĝis per belaj frititaj tripoj, per bonegaj « bovaĵ-tranĉaĵoj, per agrablega ŝinko, per kradrostaĵoj kaj « multnombraj legomsupoj...

« Post tia matenmanĝo, Gargantua iris al la preĝejo, « kie oni alportis al li, en granda korbo, dikan brevieron « enpeltigitan, pezantan, pro la kvalito same kiel pro la « fermiloj kaj la pergameno, nek pli nek malpli ol dek « unu kvintaloj kaj ses funtoj. Tie li aŭdis 26 aŭ 30 me- « sojn dum kiujn venis lia pastro, kiu estis parfuminta « sian buŝon per multaj bonaj vinoj. Post li, Gargantua « grumblis la litaniojn kaj li tiel bone zorgis pri ili, ke « falis neniu ero teren...

« Li, poste, studis dum duonhoro, kun la okuloj ri- « gardantaj la libron, sed, kiel diras la komikulo, la spi- « rito estis en la kuirejo.

« Poste, li tagmanĝis. Estante nature flegma, li ko- « mencis sian manĝon per kelkaj dekduoj da ŝinkoj, da « bov-langoj, da tripkolbasoj kaj aliaj tiaj vin-anoncantoj. « Dum tiu tempo 4 el liaj servistoj jetis en lian buŝon, « unu post la alia kaj senĉese, mustardon per ŝoveliloj. « Laŭ la sezono, li daŭrigis la manĝadon de viando, kaj « ĉesis kiam li sentis tirojn en la stomako. Pri trinkado, « li konis nek finon nek regulojn : li diris, ke oni devas « halti nur kiam la korko de la pantofloj ŝveliĝas supren « je duonfuto. »

Kompreneble, tiu studmaniero tute ne konvenas al Ponocrates, kiu tuj proponas al Gargantua tre malsimilan vivon : frua ellitiĝo kaj malfrua enlitiĝo, studado de ĉiuj sciencoj kaj artoj, praktikado de ĉiuj sportoj.

Sed dum Gargantua lernas en Parizo, en la lando de lia patro okazas strangaĵoj.

« Estis tiam komenco de aŭtuno, kaj sezono de vin- « berrikolto ; la ŝafistoj gardis la vinberojn kontraŭ la « birdoj.

« En tiu sama tempo, la platkukistoj de Lerne iris « sur la grand vojo kondukante al la urbo 10 aŭ 12 ĉarojn « da platkukoj. La ŝafistoj petis kelkajn da ili kontraŭ « pago je normala prezo...

« La platkukistoj ne volis auskulti ilian demandon, « kaj, plie, multe insultis ilin, nomante ilin parolemuloj, « sentaŭguloj, dibočuloj, mallaboremuloj, manĝegemuloj, « drinkuloj, fanfaronuloj, maldelikatuloj, mizeruloj, kaj « aliaj epitetoj misfamigaj, aldonante, ke ili ne rajtis « manĝi tiujn belajn platkukojn, sed ke ili devis sin trovi « kontentaj manĝante sekan panon kaj tortojn.

« Aŭdante tion unu el la ŝafistoj, nomita Forgier, tre « honesta homo, dolĉe respondis : « De kiam vi estas « tiom malafablaj ? Vi ja kutimis doni kelkajn al ni kaj « nun vi rifuzas. Ne estas konduto de bona najbaro... »


« Marquet, granda ĉefadvokato de la platkukista fra- « taro respondis : « Vere, vi multe fanfaronas ĉi-matene ; « vi manĝis tro multe da milio hieraŭ vespere. Venu « ĉi-tien, venu ĉi-tien, mi donas al vi el miaj platkukoj. »

« Forgier, naive, alproksimiĝis, eltirante moneron, « pensante, ke Marquet donos kejkajn kukojn, sed tiu « forte vipis liajn krurojn. Poste li volis forkuri, sed For- « gier kriis kaj ĵetis bastonegon, kiun li tenis ; ĝi atin- « gis lin je la frunta kunligo, sur la dekstra flanko. Mar- « quet falis de sur la ĉevalino pli morta ol viva. »

Kaj tio estis kaŭzo de granda milito inter Picrocole, reĝo de la platkukistoj, kaj Grangousier, reĝo de la ŝa- fistoj.

Rabelais rakontas, kiel la stulta Picrocole tuj atakas sian bonan amikon Grangousier, kaj kiel tiu lasta multe pripensas antaŭ ol voki sian filon por ke li defendu la patran landon.

Oni povas sekvi ĉiujn eventojn de tiu milito sur la ĉi-suba mapo de la ĉirkaŭaĵoj de Chinon :



La picrocole'anoj atakis Seuilly kaj ĝia abatejo, kiun defendis tre kuraĝa monaĥo nomita Jean des Entommeurs. Ili poste atakis kaj prenis « La Roche Clermaud ». Nur tiam Grangousier vokis sian filon Gargantua el Parizo. Tiu lasta haltis en Parillé, kaj stafeto iris antaŭen por vidi kie estis la malamikoj. Poste Gargantua iris ĝis la arbaro de Vède sed survoje lia ĉevalino urinis tiel multe, ke droniĝis multaj malamikoj en la travadejo de Vède. Post la detruo de la kastelo de Vède kaj bona manĝo en la kastelo de Grangousier (loko ne precizigita), ili ren- kontis la malamikojn inter Coudray kaj Seuilly. Tiu milito finiĝis per fuĝo de Picrocole tra Vau- gaudry al l'Ile Bouchard.

Inter la donacoj, kiujn faris Grangousier al ĉiuj kiuj estis kuraĝaj dum tiu milito, la plej stranga certe estas tiu farita al la monaĥo Jean des Entommeurs : Li ricevis la rajton kaj eble- con konstrui abatejon laŭ lia plaĉo. Rabelais donas tiel precizan priskribon de tiu abatejo, ke oni kapablus fari la planojn de la konstruaĵoj. Sed en tiu abatejo mankas kuirejo (!), kaj la nura regulo kiun devis sekvi la viroj kaj virinoj vivantaj en ĝi, estis :

« Faru kio plaĉas »

J.-P. GUILLOT.
(Daŭrigota)

La misteraj revelacioj de la granda piramido (II)

La geometrio kaj la fiziko de la egiptaj pastroj

Se ni transiras al alia speco de ideoj, ni tuj faros konstatojn same kuriozajn.

Herodoto raportas, ke la egiptaj pastroj lin instruis, ke la proporcioj difinitaj por la granda piramido inter la latero de la bazo kaj la ortanto estas tiaj, ke la kvadrato konstruita sur la vertikala ortanto tre ekzakte egalas la areon de ĉiu el la triangulaj edroj ; kaj, efektive, ĝi estas ja tio, kion verigis la modernaj mezurajoj. Tiu indiko montras, ke ĉiutempe la piramido de Ĥeops estis rigardata, kiel monumento, kies proporcioj estas origine kalkulitaj cele de matematikaj rilatoj.

Jam nova pruvo : oni scias, ke inter cirklo kaj ĝia diametro estas konstanta rilato nuntempe bone konata de la infanoj ; en niaj lernejoj. Por kalkuli la cirklolongon, sufiĉas multipliki la diametron per 3,1416. La geometriistoj de la antikvo konis tiun rilaton nur proksimume. Nu, adiciante la kvar laterojn de la bazo de la piramido, kies valoroj estas po 232,805 m. por un latero, oni trovas por la perimetro, t.e. por la tuta konturo 931,22 m.

Ni dividu nun tiun nombron per la duoblo de la ortanto de la piramido, aŭ 148, 208 m. ni trovas ekzakte 3, 1416, t.e. la rilato de la cirklolongo al la diametro.

Tiu monumento, unika en la mondo, estas do la materia sankcio de la nombro (3,1416), kiu ludis rolon tiel gravan en la historio de la matematiko. La egiptaj pastroj havis do konojn treege precizajn pri multaj demandoj, kiujn la scienculoj de la postvenintaj jarcentoj kredis eltrovi.

Ĉu ili konis niajn optikajn instrumentojn ? Estas permesate pri tio sin demandi post la konstato, kiun mi faris la lastajn jarojn. Tio okazis en la monato Aŭgusto 1905. Post kiam ĝi iris studi la plenan eklipson de l'suno en Sfax, mia misiitaro decidis, ke ĝi vizitos Tunision. Pilgrimado al Kartago, tiel fama en la historio, nepre altrudiĝis. De la malnova nekropolo restas cetere nenio plu, krom vilaĝo da blankaj loĝejoj sidanta antaŭ la loko de tio, kio iam estis la haveno ŝirmanta la terurajn kartagajn ŝipojn. Tie la « Blankaj Patroj » establis sian seminarion kaj konstruis la belan katedralon, kies sunlumigitaj muroj profiliĝas per krudaj tonoj sur la blua fono de l'ĉielo. La malnova Kartago ne plu ekzistas, sed manoj, piaj por ĉio, kio koncernas la antikvan malaperintan civilizacion, entreprenis esplorfosadojn kaj revivigis tiujn tempojn de la malproksima historio. La Patro Delattre prezentis al ni sian mirindan muzeon, kaj mi konfesas, ke tiu vizito estis por ni ĉiuj vera revelacio. Ĉar mi ekstaziĝis antaŭ kameo delikate gravurita, kaj kiu reprezentis ĉevalon al si gratantan la orelon, mi ne povis min deteni esprimi laŭte tiun pripenson :

— La gravuristoj en tiu epoko ne povis havi okulojn pli bonajn, ol la niaj ; kiel do, en tiel malgranda spaco, oni povis reprezenti tiom da detaloj ? Donu al mi lenson por ekzameni tiun kolhararon. Kaj ĉiuj nepre devis konfesi, ke, eĉ en tiu epoko, oni konis la prilaboradon de la vitro kaj la proprecon de la lensoj.

— Ĉu neniam vi trovis — mi aldonis, min turnante al la Patro Delattre, iun objekton rememorigantan la lensojn de niaj horloĝistoj. Sed jam la religiulo estis kompreninta, kaj unu minuton poste, li tenis en la mano lenson eben-konveksan grandan, kiel butono de surtuto. Malfeliĉe la lenso estis maldiafana ; kolektita el tombo, post jarcentoj da restado, neniel estis mirige, ke malrapida laboro efektiviĝis por opaligi tiun vitron, iam eble diafana.

La kontraŭdiro tamen estus serioza, se la Patro Delattre ne estus montrinta al ni samspecan pecon, el roka kristalo, perfektmaniere eltranĉita. Kaj tio fariĝis la lenso, kiun ni uzis por esplori la kameon. La malnovaj popoloj konis do la proprecon de la lensoj.

Mi rememorigis tiun okazon por plifortigi la analogiajn dirojn de Araga en sia Astronomie populaire. Kaj de la lenso al la mikroskopo, kaj al la lorno estis nur unu paŝo ; kaj ni tuj vidos, ke tiun paŝon la egiptaj pastroj estis veršajne transirintaj. Tio estas almenaŭ la deviga konkludo, kiun al ni trudos la astronomiaj revelacioj de la granda piramido.

La astronomiaj revelacioj de la granda piramido

Sufiĉas, ke oni ĵetu ekrigardon al la historio de la Astronomio, por konstati, kiom da penadoj estas faritaj de jarcentoj, por alveni al la kono de la distanco de Tero al Suno. Komence de siaj serĉadoj, la Grekoj imagis, ke Suno estas dika, kiel Peloponeso, kaj difinis ĝian distancon je 15 kilometroj, ekvivalente. Aristarko el Samos, kredis ĝin pli malproksima. La nombro, kiun li akceptis — 8 milion-kilometroj — estas juĝita ekzakta de Ptolemeo, Copernic, kaj eĉ Tycho-Brahe. Kepler plilongigis tiun distancon ĝis 58 milionoj.

Sub Ludoviko XIV oni taksis ĝin 125 milionoj : oni estis tre malproksima de la vero. Oni devas alveni ĝis 1864 por trovi nombron, proksimume decan. En ĉi tiuj lastaj jaroj, dank'al la progresoj de la ĉiela fotografarto la astronomiistoj povis determini tre proksimume la distancon, kiu nin disigas de la centra astro, kaj laŭ la freŝdataj mezuroj, oni devas alpreni la nombron 149.400.000 kilometroj.

Nu ! multiplikante la ortanton de la granda piramido per unu miliono oni trovas la distancon de Suno al la Tero en kilometroj nome : 148.208.000 kilometroj.

Tiu distanco estas certe nur proksimuma, sed la nombro ricevita liveras proksimumecon multe pli grandan, al tiu, kiun prezentis la oficiala valoro de tiu distanco antaŭ 1860, kaj kiu estis iom pli, ol 154 milion kilometroj.

Kiam, dum jarcentoj, la civilizitaj nacioj elspezis fabelajn monsumojn, scienculoj ne hezitis riski sian vivon en malproksimaj ekspedicioj por solvi « la plej gravan problemon astronomian ». Ĉu ne estas eksterordinare pensi, ke tiu solvo estis simboligita kaj monumentigita en la granda piramido de post miloj de jaroj ; ke estus sufiĉinte, ke niaj modernaj astronomiistoj sciu legi la simbolojn kaŝitajn en ĝiaj dimensioj, kaj ke la konstruistoj de tiu granda konstruaĵo estis atingintaj proksimumecon, pri kiu ni fieriĝus fine de la XIXa jarcento.

La egiptaj astronomiistoj ne tie limis siajn kalkulojn ; ili verŝajne mezuris Teron, kaj la egipta ulno ŝajnas fundamentita sur la dimensioj de nia terglobo. Lasttempe, la fama astronomiisto Clarke deduktis el la freŝdataj mezuradoj la polusan radion de Tero : oni povas ĝin taksi 6.356.521 metroj. Kaj tiu nombro estas nenio alia, ol la piramida ulno — t.e. O, 6356521 m. multiplikata per 10 milion. Tiel la Egiptoj estus mezurintaj kun ĝustega proksimuneco diversajn gradojn de l'meridiano, estus akordiĝintaj kun ni pri la plej malgrandaj decimaloj kaj estus alprenintaj kiel unuon de linia mezuro, la dekmilionon an parton de l'polusa radio tera !

Ni konfesu, ke tio estus strangaj koincidoj !

Se ni nun transiras al la konoj liveritaj pri la kalendaro, ni ricevos rezultatojn same mirkonfuzige precizajn.

Dividante la lateron de la granda piramido per la ulno uzita por ĝia konstruo, oni trovas la longon de la stela jaro t.e. la tempon, kiun pasigas Suno por reveni en la sama punkto de la ĉielo t.e. 365,2563 tagoj. Pri la daŭro de la civila jaro, uzita en nia kalendaro kaj kiun la Grekoj kaj la Romanoj ne povis determini ekzakte, ni ĝin retrovas multiplikante per 3,1416 la longon de la antaŭĉambro antaŭanta la ĉambro de la reĝo, kaj taksitan laŭ piramidaj coloj, kio donas tre ekzakte 365,242 tagojn.

Se nun ni multiplikos la piramidan colon per 100 miliardoj, ni ricevos la longon iritan de Tero sur sia orbito dum tago da 24 horoj, kaj tio kun proksimumeco pli granda, ol ĝin povus ebligi niaj nunaj unuoj, la angla jardo aŭ la franca metro.

Kion diri ankoraŭ pri la mezuroj de la interna kofro, kiu ekzakte rilatas al la denseco de l'terglobo ? Tiu kofro de la ĉambro de l'reĝo, mirinde eltranĉita, kaj kiu neniam estis destinita al tombo, prezentas la saman enhaveblon ol tiu de la Alianca Navo konstruita de la Hebreoj. Ne povas tie esti hazarda koincido, unuj kopiis la aliajn.

Oni ne diru, ankoraŭ unu fojon, ke ĉio tio estas ŝuldita al la hazardo, ke la Egiptoj estis sciaj pri la konkeroj de la astronomio, la faktoj estas, por montri la kontraŭon.

Tiel ekzemple la enira pasejo de la granda piramido rigardis al la tiupoka polusa stelo ; ĝi estus do orientita kun atento pri la vario de la ekvinoksoj, fenomeno laŭ kiu la ĉiela poluso revenas koincidi kun la samaj steloj, post tempdaŭro de 25.765 jaroj. *(Ni devas konfesi ke ĉi tie, kiel en kelkaj aliaj lokoj de ĉi tiu artikolo, ni ne povas plene konsenti kun abato Moreux. Se la pasejo estas direktita al la polusa stelo de « la epoko, dum kiu oni konstruis la piramidon » tio simple pruvas, ke la tiamaj astronomiistoj konis la polusan stelon, sed nenion pli — Carlo Bourlet).*

Tiu eltrovo farita en la pasinto kaj konfirmita en la freŝdataj tempoj de unuarangaj astronomiistoj, kiel John Herschell kaj Piazzi-Smith, estus eĉ por ni grand valora indiko por fiksi la daton de la konstruo de l'monumento.

Tiu procedo, kiu jam donis rezultaton ĝustan kaj akordiĝan kun la inskripcioj por la Zodiako de Denderah, liveras, kiam oni ĝin aplikas al la granda piramido, daton multe pli freŝdatan, ol tiu, kiun donas la egiptologoj. Anstataŭ 4.000 jaroj antaŭ la kristana ero, tiu procedo indikas la daton 2170 antaŭ Jesu-Kristo. Ĉar la piramido portas neniun daton de konstruo, estas malfacile decidiĝi por unu aŭ la alia el tiuj du epokoj.

Kio ajn estas, la revelacioj, kiujn ni klarigis estas despli rimarkindaj, ke ĝis nun la historiistoj estas unuanimaj por jesigi la sekvantajn faktojn :

La malnovaj Egiptoj faris nenian aludon pri la rilato inter la cirklo kaj ĝia diametro ; oni nenie vidas, ke ili havis ideon pri la distanco de Suno al Tero, pri la mezuro de la terglobo, pri ĝia pezo kaj ĝia meza temperaturo, ĉar oni retrovas tiun lastan nombron en la piramido ; la piramida aŭ sakra ulno ne estis uzata en la ordinara kutimo, neniu cetere ŝajnis en tiu epoko, suspekti la devenon de tiu mezurilo, kiu estas la ekzakta dekmilionona parto de l'tera polusa radio. Kaj, ke ĉiuj tiuj akiroj de la moderna scienco troviĝas en la granda piramido, en la stato de naturaj grandoj, mezuritaj kaj ĉiam mezureblaj, bezonantaj, por montriĝi en la lumo, la mezuran signifon, kiun ili portas kun si. tio estas certe neklarigebla de niaj konoj pri la antikva civilizacio, sed tio estas fakto kiun oni vane provus suspekti, kaj kiu enprofundigas la nunajn scienculojn en la plej grandan stuporon.

En la franca tradukis Carlo BOURLET.

(La Revuo, 1912).

Antaŭ Cent Jaroj Naskiĝis

Maksimo GORKI


Aleksi-Maksimoviĉ Pieĉkov naskiĝis la 28an de marto 1868 en Nijni-Novgorod, en familio de manlaboristoj. La pseŭdonimo, kiun li poste elektis havas la signifon de : « la Amarulo ». Kiam lia patro mortis — la infano estis tiam kvarjara — Aleksi vivis en la patrina familio kaj lia avo instruis al li la legadon. Sed pro malfacila vivo de la familio, post dujara lernado en la lernejo li fariĝis ĉifon-kolektanto. Kiam lia patrino mortis li estis dekunu jara. Li ŝanĝis sian « profesion », sed, ĉar li ŝatis plenan aeron kaj liberecon, li dungiĝis kiel kuiristo-helpanto sur boato, kiu veturis sur la rivero Volga. Influita de sia ĉefo, li fariĝis legemulo kaj vere « voris » la verkojn de Glieb Ouspenski, la kronikisto de la malfeliĉuloj, kaj tiujn de Dumas (la patro). Dekkvin jara knabo li jam parkeris la poemojn de Lermontov kaj Puŝkin. Tri jarojn poste li decidis studi en Kazan : tie li estis ŝarĝisto, ĝardenisto, ĥorano, panisthelpanto. Sed nostalgiplena, ellaciĝinta, li pafis kuglon en sian bruston.

Ĝis 1892 li multe vojaĝis : ĝis la Kaspiena Maro, kie li vivis kun fiŝistoj, tra la Mozdok stepo kaj la arbokovritaj montetoj de Jiguli ; li vizitis Ukrajnon, Krimeon kaj Kaŭkazon. Dum tempo li vivis en Tiflis, kie li aperigis sian unuan novelon : « Makar Ĉudra ». De tiu tempo li estis verkisto. Reveninte en Nijni-Novgorod, li amikiĝis kun Korolenko, kiu estis ekzilita en tiu urbo. Li publikigis aliajn novelojn, kiuj aperigitaj en du volumoj rapide elĉerpiĝis. En 1899 li verkis sian unan romanon « Thomas Gordieev ». Proleto, kontraŭulo de la politika reĝimo, jam trifoje arestita, Gorki estis en 1902 elektita membro de la Scienca Akademio.

La caro opiniis tiun elekton tro stranga kaj kasaciis ĝin. Ĉekov kaj Korolenko eksiĝis, kaj la unua teatraĵo de Gorki, « La Etburĝoj » kaj ĉefe en 1903 « la Kanajlaro » renkontis grandan sukceson ne nur en Moskvo sed en tuta Eŭropo.

De tiam la verkoj de Gorki estos ligitaj je liaj politikaj aktivaĵoj. Li aliĝis al la socia-demokrata partio kaj estris la eldonsocieton Znanie (Scio). Li redaktis manifestojn kaj fondis la unuan oficialan gazeton de la Bolĉevikoj « Nova vivo ». Li trakuris la mondon por kolekti monon. Dum sia vojaĝo en Ameriko li verkis « La patrino », romano pri la revolucia proletaro, unue malpermesita en Rusujo. Politika elmigrinto li loĝis en Kaprio. En 1907, en Londono, li amikiĝis kun Lenine. En 1909 li malfermis, en Kapri, lernejon por kelkaj bolĉevikaj laboristoj. Li poste vivis en Finnlando kaj en 1914 li deklaris sian opinion kontraŭ la milito.

La popola revolucio de 1917 plenumis la dezirojn de Gorki. Sed lia gazeto « Navaia Zizn », organo de la internaciistaj in-



telektuloj, konsideris la Bolĉevikojn uzurpintoj de la libereco kaj timis la « malhumanecon » de la kamparanaro. Li defendis la intelektulojn minacitajn per arestado. En 1921 li ekziliĝis. En Berlino li daŭre verkis kaj en 1928 revenis en Moskvo, kie li estis triumfe akceptita, kiel iniciatinto de la proleta literaturo, ĉar intertempe li realproksimiĝis al la tiama ideologio. Li fariĝis oficiala verkisto kaj multe influis la okcidentan intelektan mondon. Li klopodis apliki la direktivojn de la partio en la literaturo. Li amikiĝis kun Staline.

1932, kvardeka datreveno de lia unua literatura verko estis por li apoteoza jaro : Nijni-Novgorod, strato en Moskvo, teatro ricevis la nomon Gorki. Sed la verkisto jam de tre longe trafita de tuberkulozo mortis en 1937 apud Moskvo.

Poemoj

Verkitaj de...

... J.-G. FOWLER

Mi kun stranga, milda ravo
Revizitis la vilaĝon,
Kiu vidis la junaĝon
de mi mem kaj de la avo.

Flustris al mi nostalgio :
« Jen de via vivo fonto ».

kaj de K. VAATANEN

Pirolo,

Ie Norde — dumvintre
knabo ludanta
en neĝo brilanta
katon kruelan
vidas manĝanta
belan birdeton
ruĝpluman pirolon.

Kaj mi donis min sen honto
Al malnova tempmagio.

De l' rivero la spegulo
Kiel antaŭ sesdek jaroj
Montris min sub brunaj haroj
Kun vizaĝo de junulo.

Riverborde jen saliko.
Per folioj vent' petolas,
Kaj mi sentas, ke parolas

La sun'subiranta
plumetojn ruĝkolorajn
sur neĝo restintajn
oras.

La knabo ludanta
kun koro premanta
plumetojn belkolorajn
en manetojn siajn
kolektas.

Hejmen kurinte
al la patrino

Voĉo de infanamiko.

Antaŭ kara, blanka domo
Nun vekiĝas en la koro
Lumo de mirinda horo.
Eĥo de virina nomo.

Kaj mi per espera bato
Sur la verdan pordon frapas —
Ho ! la sorĉo tuj eskapas
... Ĉar malfermas nekonato.

la knabo ploranta
kun manoj tremantaj
priskribas jen :
La kato najbara
fiulo kruela...
kion faris ĝi ... fi, fi !

Kara patrino...
lerta patrino :
ĉu el la restintaj
plumetoj sangaj, ruĝkoloraj
novan pirolon kudros vi ?

Tradukitaj de A. Bolban

Demando kaj respondo
(G. Topârĉam)

Maĉe flavan pajlon, en ripoza kov',
Sur plugil' apoge, sin demandas bov' :
— Dio, dum aliaj vivas en la ben',
Kial mi laboru ĉiam kun la pen' ?
Tiam, al demando, longa eĥ, per mov',
El la alt' respondis :
— ĉar vi estas bov' ...

Lordo kaj lakeo
(G. Topârĉam)

Lordo, sur belega ĉevalin' rajdante,
Trans rivero eta, iam devis salte
Iri striktan ponton — kaj, ekrapidanta
Vokis la lakeon, al li ordonanta :
— Transu ĉevalinon,
Ŝultre aŭ sur spino !
— Mi ne povas, diris tiu — ja kun ver' !
— Hum ! la lord' ekgrumblas, forte en koler' :
« Pigra sin ne movas :
Diras, ke ne povas. »

Viola Vesperiĝo
(Ĝ. Bakovja)

Aŭtuna vesperiĝ' violas...
En fundo — poploj ŝajnas solaj
Kun mask' angeloj, kaj violaj —
Kaj ĉio en la urb' violas

Aŭtuna vesperiĝ' violas...
Surstrate, pigre, en la rondo —
Promen' viola de la mondo ;
Kaj ĉio en la urb' violas.

Aŭtuna vesperiĝ' violas...
El tur' sur kamp', mi vidas reĝojn —
Violajn gregojn de la leĝoj ;
Kaj ĉio en la urb' violas.

NE PLU ATENDU

Pagu vian abonon tuj.

Helpu nin per abonigo de viaj geamikoj aŭ gekorespondantoj. Ju pli kreskos la nombro de abonantoj, des pli kreskos la kultura valoro de la revuo... kaj via plezuro.

(Vidu adresojn de perantoj sur la lasta kovril-paĝo).

Por Francio : **P. BABIN**, 13, Bd la Chauvinière — 44 - NANTES

Poŝtkonto : NANTES : 2 813 61

Monologo

LA TIGRO

Mi estas tigro... Jes, tigro ! Ho ! ne timu, sinjorinoj ; mi ne manĝos iun el vi ; mi ne estas malsata. Cetere, mi ankoraŭ neniam manĝis homaĵon.

Antaŭ mallonga tempo mi fariĝis tigro, pli ĝuste, antaŭ mallonga tempo mi eksciis, ke mi estas tigro ; ĉar eble mi estis jam tia, ne sciante pri tio. Mi rakontos al vi la aferon :

La pasintan semajnon, mia edzino aĉetis ĉapelon. « Aĉetis » ne estas la tute ĝusta vorto ; aĉeti estas ja elekti, preni objekton kaj interŝanĝe doni monon, pagi por ĝi. Nu, mia edzino efektive prenis ĉapelon, sed « mi » pagis, « mi » donis la monon. Do, ne mia edzino sola estas la aĉetantino, sed ni kune, ŝi kaj mi kunlabore, aĉetis la ĉapelon.

Ĉu ĝi estas bela ? ! Mi konfesas, ke mi ne estas tre kompetenta por respondi tiun demandon. Unu aferon mi povas diri : ĝi estas larĝa. Tamen, eĉ pri tio, mia opinio ne estas grandvalora ;ĉar ĉiu ĉapelo kompreneble havas sian larĝecon, estas larĝa, pli aŭ malpli, nur kompare kun alia ĉapelo oni povas taksi ĝian larĝecon, Mi do simple diros, ke la nova ĉapelo de mia edzino, aĉetita kunlabore de ŝi kaj mi, estas pli larĝa, ol la antaŭa. Pri la koloro ankaŭ, mi havas ne tre certan opinion. Ŝajnas al mi, ke ĝi estas precipe ruĝa, kun bluaj kaj verdaj ornamaĵoj, plumoj, rubandoj aŭ floroj. La tuto havas ian violkoloran aspekton. Pli detalan priskribon mi ne kuraĝas doni al vi.

Koncerne la prezon tamen, mi estas multe pli certa. Nia ĉapelo estas sufiĉe kara ; kompare kun la antaŭa, ĝi valoras tri spesmilojn pli.

Nun, kiam vi estas informitaj pri la ĉapelo, mi devas diri al vi, ke mi estas laboranta homo, laborante pro du kaŭzoj : unue, ĉar mi estas nature laborema, kaj due, ĉar mi ne estas riĉulo, sed devas labori por nutri mian familion, por aĉeti la multajn aferojn necesajn en la vivo : panon, ĉapelojn, k.t.p. Mi do laboras, laboras, kiel negro... Kiel blanka negro. Dum ses tagoj ĉiusemajne, mi skribas en la oficejo, mi kuras sur la stratoj, mi vizitas la klientojn, kaj tiamaniere mi lacigas mian cerbon kaj miajn krurojn. Sed, kiel rekompencon, mi havas trankvilan konsciencon kaj, post la sestaga laborado, mi tre ŝatas la dimanĉan libertagon.

Dimanĉe, mi leviĝas iom pli malfrue, mi manĝas iom pli malrapide, mi legas esperantajn gazetojn, kaj mi trankvile ripozas, ĝuante la familian vivon kune kun mia kara edzino kaj mia kara bopatrino. — Nur el tiuj du virinoj kaj mi mem konsistas mia familio.

La lastan dimanĉon, mi kiel kutime leviĝis iom malfrue, trankvile ĝuis mian matenmanĝon kaj komencis legi en « La Revuo » la belajn artikolojn de niaj plej famaj literaturistoj.

Subite mia edzino parolis : « Karulo, la vetero estas tiel bela : ĉu ni ne iros iom promeni sur la granda placo kaj enspiri freŝan aeron aŭdante la muzikon ? ».

— « Kio ? » mi ekkriis, mirigite. La vetero vere estis sufiĉe bela, sed ĝis nun mi neniam estis rimarkinta, ke mia edzino havas tian amon al muziko ; kaj pri la freŝa aero, ŝajnis al mi, ke ni povus ĝin enspiri multe pli agrable en nia propra ĝardeneto, ol sur la granda placo, meze de densa popolamaso.

Mia edzino reparolis : « Mi surmetus mian novan ĉapelon ».

Tiu ĉi frazeto tuj komprenigis al mi, ke nek la muziko, nek la freŝa aero estas la vera kaŭzo de la projektita promeno, sed la ĉapelo, nia « kara » ĉapelo.

Mi tamen ĝentile esprimis la deziron daŭrigi la legadon de « La Revuo » kaj la dimanĉan ripozadon. La rezultato estis terura : la edzino sidfalis sur seĝon kaj ploris, ploregis, kvazaŭ la plej granda malfeliĉo estus okazinta.

Je tia bruego ŝia patrino alkuris kaj kompateme demandis pri la kialo de ŝiaj larmoj. « Li ne volas, ke ni iru promeni ! Por kio do utilos mia ĉapelo ? — Kiel ! bofilo, vi ne volas ?... — Ne, sinjorino, mi preferas resti hejme. — Ha ! ŝi diris, mi komprenas. Vi scias, kiel bone aspektos via edzino kun sia nova ĉapelo, kiel dolĉa kaj bela ŝi estos, kaj vi timas, ke la junaj viroj tro admiros ŝin. Jen la kaŭzo de via stranga konduto. Vi estas ĵaluza kiel tigro ! — Kiel tigro ? — Jes, sinjoro, vi estas tigro, vera tigro ».

Tiamaniere, sinjorinoj, mi eksciis, ke mi estas tigro. Kaj nun, kion mi faros ? Ĉu vi povos doni al mi konsilon ?. Eksedziĝon ? jes, mi jam pensis pri ĝi ; sed ĝi necesigas multajn klopodojn kaj multe da tempo. Ha ! mi scias, kion fari ; mi tuj bruligos nian malbenindan ĉapelon. Bona ideo !... Ĝis la revido !

Sam MEYER (La Revuo 1911-1912)

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Unua problemo
(20 poentoj)

En la ĉisuba teksto, bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj. Atentu ! Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste elektita, sed estos forprenita po I poento por ĉiu vorto ne korekta :

« Esperanto, diris elokvente .... Privat, estas « vivanta lingvo de vivanta popolo ». Trafa kaj .... vera estas tiu ĉi formulo. Nia lingvo vivas. Sed .... ke ĝi vivas, ĝin oni ne .... konsideri kiel .... maŝinon, ... diversaj pecoj kaj partoj estas .... ŝangeblaj aŭ forigeblaj.

« Kun respekto, kun pia respekto, ni devas ĝin trakti ne .... ĉar, internacie komuna lingvo, ĝi estas propra apartenaĵo de .... nacio, de neniu eĉ plej lerta, plej scienca personaro aŭ persono, sed ankaŭ .... tiu speciala delikateco, kiun ĝi ŝuldas al sia viveco mem ».

Dua problemo
Vortplektaĵo (20 poentoj)

1 KARATO	9 ENKETO
2 RIMEDO	10 ASPIDO
3 HEPATO	11 KATENO
4 ĈERIZO	12 ORANĜO
5 ATENCO	13 ESPERI
6 ARESTI	14 KOLORO
7 ADORAS	15 SABATO
8 POKALO	16 PIRATO

Tra la supre videblaj 16 vortoj iras unu proverbo, kiu konsistas el 32 literoj. La unua litero de la proverbo estas en la unua vorto, ĝia dua litero en la dua vorto, kaj tiel plu ĝis ĝia 16a litero, kiu estas en la 16a vorto. En tiu vorto la proverbo turnas sin kaj komencas reiri tra la samaj vortoj ĝis ĝia 18a litero en la 15a vorto ktp, kaj fine ĝia 32a kaj lasta litero troviĝas en la unua vorto.

La literoj 1-16 de la proverbo estas troveblaj en la autaŭaj duonoj de la vortoj, la literoj 17-32 en la malantaŭaj duonoj de la vortoj.

Bonvolu sendi viajn respondojn autaŭ la 15a de Aprilo rekte al : Sro P. Chevalier, 19, Bd Gabriel-Lauriol, 44 - Nantes - Francujo.

Ĉar la apero de la gazeto estis iomete malfruigita, ni estos indulgemaj al malfruaj konkursantoj, precipe al eksterlandanoj.

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solvo de la « rugbeo-teamo » ludo :
Ronda pilko (futbal-pilko) — ludanto ĉe la maldekstra flanko ne surhavas ŝuojn — apud li alia ludanto ne surhavas la saman vestaĵon — futbalgolejo anstataŭ rugbe-golejo — la kvina ludanto de la dekstro havas tri brakojn — mankas kruro al la kvrara de maldekstre.


Novaj problemoj :

La du vetkurantoj : Du vetkurantoj A kaj B eliras samtempe el sama punkto por iri ĝis difinita celo. « A » trairas la vojiron egalmezure po 300 metroj en unu minuto. « B » trairas la unuan duonon de la vojiro po 280 metroj en unu minuto kaj la dua duonon po 200 metroj en unu mniuto.

1) Kiu el la vetkurantoj, estos la unua ĉe la celo ?

2) Se la unua alvenas 15 sekundojn antaŭ la alia, kiu estas la longo de la vojiro ?

LUDO DE DIFERENCOJ : Sin kaŝas ok diferencoj en la subaj de segnoj — Trotu ilin




GRAMATIKO PER BONHUMORO

« **Pri** : kiel prefikso signifas :


— ke oni aplikas al difinita objekto la ideon enhavatan laŭ absoluta senco en la simpla verbo t.e. ke oni transitivigas netransitivan verbon ;

— ke la kunmetita verbo havas komplementon de pli granda amplekso ol tiu de la simpla transitiva verbo »

(Plena Vortaro).



— Ĉu estas necese tiom prilumi nian amon ?



— Oni neniam tro prikantos komforton.



— Pripensu, fraŭlino ! Je mia aĝo temas pli certe pri galveziko.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (12 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk : Tu 60253 (7 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO 90 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6.

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).

Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 1 de 1968, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Les premières fleurs sont apparues à Grésillon. L'hiver sera bientôt à classer aux archives. Son dossier tiendra peu de place ; car après le remue-ménage de l'automne qu'a traversé le grondement des bull-dozers et des pompes, tout s'est endormi, et l'activité est restée administrative : préparation des stages 68, établissement des programmes, propagande, réponses aux demandes de renseignements, établissement du compte d'exploitation 1967, préparation de l'Assemblée Générale.

Celle-ci aura lieu le 24 mars. Elle fera le bilan des activités passées ; bilan positif si l'on considère les investissements réalisés ; négatif sur certains points car tout ce qui aurait pu être fait ne l'a pas été. Le reversement du « don » qui nous avait été fait pèse lourd chaque année et pèsera lourd encore pendant 3 ans. La somme reversée chaque année permettrait de si belles réalisations ! Mais ne nous attristons pas puisque malgré ce handicap la Maison poursuit sa route. Elle la poursuit malgré certaines difficultés, grâce à l'aide de quelques-uns, grâce à l'amitié du plus grand nombre. Tout n'est pas parfait. Les progrès ne sont pas aussi rapides que nous le voudrions, d'une part, parce que les finances ne le permettent pas, d'autre part, parce que pour nous tous le travail d'administration de la Maison (et il est très divers) vient s'ajouter aux occupations professionnelles lourdes elles aussi. L'organisation de stages en dehors des époques consacrées pose des problèmes d'administration, de personnel. Nous devons avoir constamment l'œil fixé sur les colonnes dépenses et les colonnes recettes de notre livre de comptes et il peut arriver qu'une rencontre valable sur le plan culturel peut-être, ne l'est pas sur le plan financier. Or la Maison ne peut pas se permettre d'écarts dans ce domaine et seuls ceux qui manipulent les chiffres peuvent s'en rendre compte. Nous mesurons souvent la distance qui sépare ce que nous voudrions ou aimerions faire de ce qu'il est possible ou sage de faire. Il serait bien agréable souvent d'organiser des rencontres avec le seul souci d'efficacité culturelle ou de propagande sans considération d'équilibre financier. Mais dans l'état actuel des choses cela nous est interdit, car les dépenses annuelles constantes sont très élevées et il est impossible de préjuger ce que sera l'année à venir. Cet écart entre les désirs et la réalité, nous aimerions que tous les espérantistes en aient pleine conscience.

L'équipe dirigeante fait tout son possible, sacrifiant parfois une partie de sa vie personnelle. Elle ne se contente pas de se féliciter des résultats obtenus. Elle n'a pas établi de plan mais elle a des projets. Vous pouvez l'aider à les réaliser, au fur et à mesure des possibilités en lui donnant votre appui.

Pierre BABIN.

LA VIE DE NOTRE REVUE

Les abonnements 1968 nous parviennent nombreux. Merci à tous. Merci également à ceux qui ont par la même occasion régularisé leur abonnement 67.

Mais n'oubliez pas de nous signaler vos changements d'adresse. Quelques numéros nous reviennent avec la mention « n'habite pas à l'adresse indiquée ». Or les numéros précédents ne nous étaient pas revenus.

ABONNES BIENFAITEURS 1968

Liste nº 3

M. Fabert (Seine-et-Marne)	12 F.
M. Clément (Ilaine-et-Vilaine)	15 F.
M. Genuit (Aube)	12 F.
M. Salasc (Hérault)	12 F.
M. Marmou (Seine-et-Marne)	12 F.
Mlle Clavier (Rhône)	12 F.
Mme Mouneyou (Lot-et-Garonne)	12 F.
Mlle Savy (Puy-de-Dôme)	12 F.
Mme Delor (Norvège)	14 F.
M. Bourdelon (Bouches-du-Rhône)	12 F.
M. Guarrigue (Bouches-du-Rhône)	12 F.
Mme Jurquet (Bouches-du-Rhône)	12 F.
M. Cadenel (Bouches-du-Rhône)	12 F.
M. Reymond (Bouches-du-Rhône)	12 F.
Mme Bourrié (Bouches-du-Rhône)	12 F.
Mme Villanova (Bouches-du-Rhône)	12 F.
M. Debertonne (Yvelines)	12 F.
M. Lefebvre (Sarthe)	12 F.
M. Lanz (Seine-St-Denis)	12 F.
Mlle Chatelus (Rhône)	12 F.
M. Cnudde (Nord)	12 F.
M. Jullien (Bouches-du-Rhône)	12 F.
M. Nouveaux (Isère)	12 F.
M. Robert (Val-de-Marne)	12 F.
Mme Boyer (Maine-et-Loire)	12 F.
Mlle Texier (Loire-Atlantique)	15 F.
M. Beliard (Loire-Atlantique)	12 F.
Mlle Tulasne (Maine-et-Loire)	12 F.
M. Ligot (Nord)	12 F.
M. Henaux (Hauts-de-Seine)	20 F.
Mlle Hedelin (Paris)	12 F.
M. Decorbert (Nord)	15 F.
M. Gaudeau (Essonne)	12 F.
Mme Claitte (Rhône)	12 F.
M. Schertzer (Jura)	12 F.
Mme Lemonnier (Hauts-de-Seine)	12 F.
M. Legros (Nord)	12 F.
M. Cousse (Sarthe)	12 F.
Mlle Carre (Rhône)	12 F.
M. Reyneau (Maine-et-Loire)	12 F.
M. Laurent (Charente)	12 F.
Mme Marbœuf (Maine-et-Loire)	12 F.
Mme Ressort (Bouches-du-Rhône)	12 F.
Mme Fraccioli (Bouches-du-Rhône)	12 F.
Mlle Chatelain (Calvados)	12 F.
Mme Apcher (Vaucluse)	12 F.
M. Marly (Gironde)	12 F.
M. Rousseau (Paris)	12 F.
M. Benistant (Sarthe)	12 F.
Mme Micard (Mayenne)	12 F.
M. Chevalier (Loire-Atlantique)	12 F.
M. Schrapp (All. Féd.)	12 F.
Mme Aude (Indre-et-Loire)	12 F.
Mlle Chérault (Yvelines)	12 F.
Mme Guillot (Haute-Savoie)	12 F.
M. et Mme Philippeau (Loire-Atlantique)	24 F.
M. Barre (Loire-Atlantique)	12 F.
M. Valluet (Loiret)	12 F.
M. Hebert (Seine-Maritime)	12 F.
Sino Gucz (Pologne)	12 F.
Mme Bidet (Allier)	12 F.
Mme Lucas (Seine-Maritime)	12 F.
M. Montagne (Eure)	12 F.
M. Lherbier (Sarthe)	12 F.
Mlle Bopsic (Yougosl.)	12 F.
M. Anton (Allemagne)	12 F.
M. Laforest (Saone-et-Loire)	12 F.
M. Ciret (Indre-et-Loire)	12 F.
Mlle B. Desnos (Paris)	12 F.
Mlle M. Desnos (Mayenne)	12 F.
Mlle Arnould (Haute-Marne)	12 F.
Mlle Beauvais (Oise)	12 F.
Mme Michaud (Seine-St-Denis)	12 F.
Mme Bariteaud (Alpes-Maritimes)	12 F.
M. Legret (Calvados)	12 F.
M. Trepied (Haute-Savoie)	12 F.
Mme Pallard (Sarthe)	12 F.
Mlle Laporte (Doubs)	12 F.
M. Chasseriaud (Charente-Maritime)	12 F.
M. Micard (Calvados)	12 F.
Mme Horault (Maine-et-Loire)	12 F.
Mme Leduc (Loire-Atlantique)	12 F.
M. Unchutti (Thaïlande)	12 F
Total	**1027 F.**

NOS PEINES

Mlles Madeleine Desnos (Laval) et Berthe Desnos (Paris), sociétaires de la MCE, ont eu la douleur de perdre leur père. Nous leur présentons nos condoléances.

VOUS POUVEZ NOUS AIDER

Nous recevons toujours des timbres-poste neufs des pays de l'Est en paiement d'abonnements à notre revue. Nous avons en particulier des séries de Tchécoslovaquie, Hongrie, Roumanie, Bulgarie, Pologne, Allemagne de l'Est. Vente à 50 % du tarif Yvert et Tellier, par lots de 5,00, 10,00, 20,00 frs... S'adresser à Sino Gilloteaux 3 allée Béranger 59 Croix.

NOTRE LIBRO-SERVO

Nous vous recommandons :

— ABC d'Esperanto à l'usage de ceux qui aiment les lettres par le Prof. Waringhien - 2e édition	3,50
— Fajro sur mia lango, par Ed. de Koch - poèmes	9,00
— Vesperkanto - Hendrik Adam - poèmes	9,00
— Okuloj - Marjorie Boulton - nouvelles	10,00
— Tra la mondo, par A. Ribot - cours en 6 disques 7 livrets et un précis grammatical	86,70
— Junul Kurso - 5 disques	12,00
— Por la Praktikantoj (2e édition) de P. Babin cours du 2e degré - nombreuses illustrations	8,50
— Nouveau : Jen nia mondo Bob Dylan chanté en Esperanto par Duo Espera disque 30 cm - stéréo-mono	25,00

Nos prix comprennent les frais d'envoi. Voir adresse sur la page catalogue jointe.

PROGRAMME 1968

PAQUES **(4-11 Avril) :**

6e SEMAINE CULTURELLE

(organisée par U.E.F. — dirigée par M. Boyet, président du G.E.E.)
Cours - Initiation pédagogique à l'enseignement -
Application Culturelle - Conférences - Excursions.

30 Juin - 21 Juillet :

ETUDES ESPERANTISTES

(dirigées par M. Ribot)

Cours pour débutants - Cours pratique - Cours supérieur - Examens.
Activités diverses - Excursions.

21 Juillet - 3 Août :
(départ possible le 1er Août)

SEMINARIO

(organisé par U.E.A. et dirigé par le Dr Zlatnar)

Thème « **Formes modernes de travail dans le mouvement espérantiste actuel** ».
Conférence par le Dr Lapenna et de nombreux autres responsables compétents du mouvement espérantiste.
Excursions — Rallye.

4 Août - 25 Août :

SEMAINES ESPERANTISTES ET CULTURELLES

Trois cours - 4e cours plus spécialement destiné aux candidats au Pedagogia Atesto, pendant la dernière semaine. -
Reliure - Vannerie - Causeries - Films - Excursions.

25 Août - 8 Septembre :

PERIODE D'ETUDES

(organisée par U.F.E. et dirigée par M. Ribot)
Cours pour débutants - Cours de pratique - Examens.
Causeries - Films - Excursions.

Après cette date : éventuellement séjour de repos.

LE CHATEAU PEUT RECEVOIR DES GROUPES ENTRE PAQUES ET JUILLET

SERVICE - LIBRAIRIE

Adresser votre commande et votre chèque de paiement au nom de : M.C.E. 1485-39 Nantes, à :

M. GUILLOT, lotissement Deshoullières, route de Limoges, 86 - POITIERS

Nos prix sont indiqués franco de port à partir de 5 F.

LIVRES D'ETUDE

Esperanto manuel, par Warnier	8,00
Esperanto por infanoj	3,00
Junulkurso par S.A.T. amikaro	7,00
Ni parolu en esperanto, de A. Ribot	4,00
Por la praktikantoj, de P. Babin	8,50

DICTIONNAIRES

Vocabulaire de poche, de Bastien	3,30
Dictionnaire pratique (S.A.T.)	13,80
Dictionnaire Français-Esperanto, de Léger et Albault	22,00
Grand dictionnaire Esperanto-Français, de Waringhien	34,50
Plena vortaro, par S.A.T.	17,00

DISQUES

Tra la mondo : 6 disques, 7 livrets, 1 Précis grammatical de A. Ribot, le tout	86,70
6 disques seuls	42,00
7 livrets seuls	48,00
Junul - Kurso - 5 diskoj por kompletigi la lerno-libron	12,00

LIVRES POUR ENFANTS

1 livre	1,12
La série de 10 livres	10,00

HISTOIRE DE LA LANGUE ET DU MOUVEMENT

Lexique fondamental, par Léger		6,50
Aventuroj de pioniro, de E. Privat		9,00
Dialekto dialektiko, de Dalmaù		4,00
Esperanto, fil d'Ariane, de P. Delaire		12,50
Fundamento de Esperanto	rel.	18,20
	bro.	13,70
Fundamenta krestomatio		17,50
Historio de la lingvo esperanto, de E. Privat		10,50
Lingvo kaj vivo, de Waringhien		20,00
Lingvaj respondoj, de L.L. Zamenhof	rel.	11,00
	bro.	8,20
Planlingvaj problemoj, de W. Gilbert		6,00
Proverbaro esperanta		8,00
La zamenhofa esperanto		20,00
Le Docteur Esperanto, de Maria Ziolkowska	rel.	14,10
	bro.	6,95
Retoriko de Lapenna		17,00
Vivo de Zamenhof, de E. Privat		8,00
Zamenhof, aùtoro de Esperanto, de M. Boulton		17,00
Vindianta, notre patrie préhistorique retrouvée par Petro Stojan		1,00

ROMANS

Bill kaj Lazuraj okuloj aŭ du kuleretoj da ĉielo de Atus Goldoni. Lina Gabrielli		4,50
La eta princo, de A. de Saint-Exupéry		13,00
Fabeloj de Andersen		15,00
Frisaj rakontoj en esperanto de diversaj aŭtoroj		9,50
Homoj kaj riveroj, de J.H. Rosbach		9,50
Homoj sur la tero de S. Engholm	bro.	12,00
	rel.	16,00
Infanoj en Torento, de S. Engholm (2 vol.)		4,50
Kiel akvo de l'rivero, de R. Schwartz		17,00
Koloroj, de Julio Baghy		4,00
La kombilo de Lina Gabrielli		4,50
Kredu min, Sinjorino, de C. Rossetti		10,00
Malsata ŝtono, de R. Tagore		13,00
La marvirineto, de Andersen		12,00
Tiel okazis aù Mistero minora, de F. Szilagyi		9,50
La naùzo, de J.-P. Sartre	rel.	20,50
	bro.	17,50
Normandaj rakontoj, de Maupassant		18,00
Quo vadis, de H. Sienkiewicz		12,00
Sen eliro et La respektema p..., de Sartre		8,60
Specimene, de H. Beaupierre		8,00
Taglibro, de A. Frank		11 00
33 rakontoj. La esperanta novelarto		17,00
La verda raketo, de Jean Forge		12,00
Vivo kaj opinioj, de Majstro M'saud, de Jean Robillard		7,50
Novaj vestoj de la imperiestro de Andersen		12,00
Maŝinmondo de Szathmari		7,50
Sen paraŝuto de Poul Thorsen		6,00
Sub stelo rigida de Porsteinn Fra Hamri		6,00

Et de nombreux autres ouvrages non mentionnés.

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

Maison Culturelle Espérantiste

Renseignements :

Château de Grésillon

49 - BAUGÉ

Tél. 34